

ĈEA-retkomunikoj 2011/05

ĈEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonajn. Se vi tamen ne volas ricevi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

Enhavo:

1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO
2. NOVA BANKA KONTO POR PAGI AL ĈEA
3. AKTUALAĴOJ
4. NATURSCIENCAJ ESPERANTO-VORTAROJ LIBERE ELŜUTEBLAJ
5. ĈEJ AKTIVAS
6. LISTO DE ARANĜOJ
7. BONDERIZOJ

1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO

Jen la lasta numero de ĈEA-retkomunikoj en jaro 2011. Eble vi ne legos ĝin tuj nun, sed post kristnaskaj festoj, sed ĉiukaze mi esperas, ke ankaŭ tiu ĉi numero plaĉos al vi. Tiu ĉi numero ne estus, se ne estus kelkaj homoj, al kiuj mi ŝatus danki pro ilia subteno: unue tio estas mia kolegoj el redakta teamo, do Pavla Dvořáková, Petr Chrdle kaj Marek Blahuš. Due miaj dankoj apartenas al ĉiuj kontribuantoj, kiuj sendas al mi informojn pri aranĝoj, sed ankaŭ aliajn interesajn informojn. Trie tio estas VI! Jes, VI, kara leganto! Al vi ankaŭ apartenas mia danko, ke vi legas ĈEA-retkomunikojn.

Mi atendas viajn proponojn kaj komentojn, ne timu skribi al mi iun ajn proponon, kion vi ŝatus trovi en la Retkomunikoj, kion vi ŝanĝus ktp. Mia adreso estas: miropiro2312@gmail.com.

2. NOVA BANKA KONTO POR PAGI AL ĈEA

Bonvolu uzi por ĉiuj viaj pagoj al ĈEA la novan bankan konton 2800186228/2010. Vi povas simple ĝiri monon de bankkonto aŭ kontante pagi per la poŝtbileto "A" kontraŭ 22 kronoj (ĝis sumo de 5 mil kronoj). La nova banko de ĈEA ne kontas ajnan servkoston kaj ebligas eĉ ricevi certan interezon. Detalajn informojn (en la ĉeĥa) kiel ĝuste identigi viajn pagojn vi trovos ĉe <http://www.esperanto.cz/cs/kontakty-a-organizace/cesky-esperantsky-svaz/clenstvi-a-finance/zpusoby-plateb>



Ne forgesu, ke ĈEA havas ankaŭ krom la nova banka konto ankaŭ novan adreson: Český esperantský svaz, Náměstí Míru 89/1, 568 02 Svitavy

3. AKTUALAĴOJ

NOVAĴOJ EN ALBUMO ZAMENHOF (omaĝe al lia naskiĝdato 15.12.):

Krom novaj artikoloj ankaŭ filmeto „Zamenhof mondĉivitano“, fabeloj de Andersen en lia traduko, poemo „Ho mia kor“ en prezento de la muzikgrupo Merlin, satira parodio je la poemo „La Vojo“, analizo de la horoskopoj de Zamenhof, interesaj fotoj (aviadilo, trajno kaj ŝipo portantaj nomon Zamenhof) k.a. <http://www.ipernity.com/doc/181031/album/230642> Ni



rememorigas ampleksan retligilaron dediĉitan al d-ro Zamenhof

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/nova-retligilaro-pri-d-ro-zamenhof.html> Anoncitaj Zamenhof-festoj okazis tiutage en nia lando en Prago kaj Brno . Kiel Festo de Esperanta kulturo la tago estis solenata dum AnKRo (Antaŭkristnaska renkontiĝo) en Písek, kies parto estis ankaŭ kultura matinee por publiko. Tiuokaze ni instigas vin ne forgesi foje aĉeti kaj legi aŭ aŭskulti artverkojn en Esperanto. Sen vi, aktivaj uzantoj, Esperanta kulturo ne povas progresi! disponeblas por vi Libroservo kaj biblioteko de ĈEA (vidu rubrikon Kontaktoj en www.esperanto.cz), eldonejo KAVA-PECH (www.kava-pech.cz), muzea paĝo ĉe Ipernity (<http://www.ipernity.com/home/181031>). Bv. vizitadi kaj uzadi <http://www.esperanto.cz/eo/ligiloj/kulturo>. Ni akceptas ankaŭ proponojn por aĉetindaj librotitoloj por la venonta jaro (skribu al malovec(heliko)volny.cz)

VÁCLAV HAVEL KAJ ESPER(ANT)O

En la artikolo vi povas konatiĝi kun oficiala kondolenco de ĈEA, kun rilato de Václav Havel al Esperanto kaj al espero kaj kun liaj politikaj meritoj rekte ligitaj kun libera evoluo de Esperantomovado. Legantoj estas invitataj aldoniĝi per propraj komentarioj.

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/vaclav-havel-kaj-esper-ant-o.html>



Łukasz Żebrowski (prezidanto de TEJO), d-ro Seán Ó RIAIN (irlanda diplomato, prezidanto de EEU), Etsuo Miyoshi (mecenato de Esperanto), Eduardo Kozyra (vicprezidanto de pola societo EDE), Václav Havel, Peter Baláž (E@I el Slovakio), Tobiasz Kaźmierski (TEJO-volontulo en CO de UEA). Fotis Andreo Sohacki.



NIA MUZEA BIBLIOTEKO SUKCESIS EN SUBVENCIA KONKURSO

de la fonduso Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen kaj sukcesis ricevi 155 eŭrojn por kompletigo de la librokolekto per novaj valoraj publikaĵoj, kiuj estos kompreneble disponeblaj ankaŭ por ĈEA-membroj. La listo de la menditaj libroj troviĝas en: <http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/nia-muzea-biblioteko-sukcesis-en-subvencia-konkurso.html>

ETA KRISTNASKA BIBLIOTEKO POR VI

Kolekto de novaj retaj ligiloj al beletro, kantoj, sonregistraĵoj kaj filmetoj kun kristnaska temo disponeblas en

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/eta-kristnaska-biblioteko-por-vi.html>

Malgranda kolekto de esperantaj kristnaskaj bildkartoj (kompletigota je novjaraj) troviĝas en <http://www.ipernity.com/doc/181031/album/257895>.



4. NATURSCIENCAJ ESPERANTO-VORTAROJ LIBERE ELŜUTEBLAJ

Sistema ĥemia nomenklaturu en Esperanto: Konkiza enkonduko. 40 p. PDF; Adreso: <http://www.sistema-nomenklaturu-eo.iplace.cz> aŭ <http://www.sistema-nomenklaturu-eo.mypage.cz>



Ĉesko-esperantský a esperantsko-ĉeský slovníček léčivých rostlin / Ĉeĥa-Esperanta kaj Esperanta-Ĉeĥa Vortareto de Medicinaj Vegetaloj. 34 p. PDF; Adreso: <http://www.vortaro-med-veg-cs-eo.mypage.cz>

Konciza Imunoĥemia Vortaro Esperanta. 36 p. PDF; Adreso: <http://www.imuno-vortaro-eo.mypage.cz>

Konciza Agroĥemia Vortaro Esperanta. 35 p. PDF; Adreso: <http://www.vortaro-sterk-agro-eo.mypage.cz>

Aŭtoro de vortaroj estas Zdeněk Pluhař, al kiu mi ŝatus ĉi tie danki por kontribuo.

5. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS

(oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)



Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) festis la Zamenhofan tagon plurfoje: Jam la 10-an de decembro, Mirek HRUŠKA kaj Mirek MALOVEC partoprenis feston en Vieno. La 14-an de decembro poste junuloj festis okope en Brno (ĉe kristnaska foiro kaj en kafejo), kaj la 15-an kvinope en Prago (en restoracio kaj ĉe Vyšehrad). Marek BLAHUŠ ĉeestis la feston en Bruselo la 17-an de decembro.


La 24-an de novembro renkontiĝis la brna klubo kun pola esperantistino. La 25-an Mirek HRUŠKA vizitis Bratislavon kaj kunvenis tie kun ses lokaj junuloj. Marek BLAHUŠ dum la semajnfino 26-an kaj 27-an de novembro partoprenis la Malferman tagon de UEA en Roterdamo, kie li dimanĉe kunaranĝis kun Ziko VAN DIJK seminarion pri libera scio (Vikipedio).

Artikolo de Mirek HRUŠKA pri la 67-a IJK en Kievo aperis en la revuoj Esperantisto Slovaka kaj Zagreba Esperantisto. Daniel MRÁZEK rezignis pri la posteno de redaktoro de TEJO Tutmonde. Plu daŭras ĝis fino de januaro la konkurso "Lernu Esperanton kaj gajnu eksterlandan vojaĝon" lanĉita de ĈEJ (<http://soutez.esperanto.cz>). Oficialiĝis intertempe la emblemo de ĈEJ, kiu aperas interalie en la renovigita retpaĝaro ĉe <http://cej.esperanto.cz/>

6. LISTO DE ARANĜOJ

La plej proksimaj aranĝoj

2011-12-29/30: Tradicia Silvestro-balo en Česká Třebová. Tradicia-netradicia silvestra maskobalo kun multe da amuziĝo. Ĉi-jara ĉeftemo: Kiel belaj estas niaj legendoj ĉeĥaj... Info: jk.esperanto@seznam.cz



Aranĝoj en jaro 2012

2012-04-16-22: Lingva seminario de AEH en Skokovy Informoj ĉe Jindřiška Drahotová: drahotovaesperanto@seznam.cz

2012-06-12: Muzea nokto en Svitavy. Info: muzeagrupo@esperanto.cz
2012-07-01-/14, 07-15/28, 07-29/08/10: Tri etapoj de la 59-a Somera Esperanto-Tendaro en Lančov apud Vranov-lago. Info: info@set-lancov.cz, <http://www.set-lancov.cz>
2012-07-08/14: Turisma antaŭkonferenca renkontiĝo en Prago. Organizita precipe (sed ne nur) por la partoprenontoj de IEK en Svitavy. Oni loĝos en la hotelo Krystal kaj kun esperantlingva ĉiĉerono esploros Pragon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon. Info: chrdle@kava-pech.cz
2012-07-10/15: La 18-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso en Opava kun la ĉeftemo „Depresio kiel kromefiko de kronikaj malsanoj“. Info: Eva.Kopecna@ivax-cz.com
2012-07-14/20: Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK en Svitavy. Tutsemajna aranĝo kun la temo „Sciencfikcia literaturo kaj robotoj“ kaj ĝia turisma antaŭprogramo en Prago 2012-07-08/14. Info: www.kava-pech.cz/iek aŭ chrdle@kava-pech.cz
2012-07-20/23: Poskonferenca turisma restado en Svitavy. Info: chrdle@kava-pech.cz
2012-08-10/12: Renkontiĝo de iamaj partoprenintoj de Someraj Esperanto-Tendaroj en Lančov. Info: info@set-lancov.cz, <http://www.set-lancov.cz>
2012-09-13-16: La 6-a kongreso de AEH-IKEH (handikapitaj esperantistoj) en ripozdomo Štíří důl u Krucemburku (Skorpia valo ĉe Krucenburk. Info: aeh-ikeh@volny.cz
2012-09-27/30: Trilanda konferenco - Komuna konferenco de austraj, ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj. Info: www.esperanto.cz aŭ komitato@esperanto.cz

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed sendu la informon pri ĝi al miropiro2312@gmail.com (atentu la novan retadreson!). Ne eblas envicigi aranĝon, pri kiu ni ne scias.

Atentu, ke la plej kompletan kalendaron de Esperanto-eventoj en la tuta mondo, sed ankaŭ plurajn utilajn informojn, vi trovos ĉe www.eventoj.hu

7. BONDEZIROJ

Nome de la redaktokonsilio de ĈEA-retkomunikoj kaj ankaŭ propranome mi deziras al ĉiuj abonantoj de la ĈEA-retkomunikoj agrablajn kristnaskajn kaj jarŝanĝajn festotagojn kaj sukcesan jaron 2011.

Miro Piro (Miroslav Hruška), redaktoro de ĈEA-retkomunikoj

ĈEA-RETKOMUNIKOJ 2011/5

Kontakto al ĉefredaktoro: Miroslav Hruška –
miropiro2312@gmail.com

Redakta teamo: Petr Chrdle, Pavla Dvořáková, Marek Blahuš

